

bulteno

de Esperantista Klubo en Praha
Věstník Klubu esperantistů v Praze

N-ro 3/2006 (178)

Prosinec / decembro 2006

Z obsahu – el la enhavo:

H. Filová: Kristnaska nokturno	4
Z. Bergrová: Infanoj de la respubliko	6
Č. Vidman: Fabloj	9
J. Ondráček: Miaj lingvaj spertoj	12
Jubileo de Eli Urbanová	14
J. Karen: Sub la libera ĉielo	16
Č. Vidman: Al Karel Havlíček Borovský	18
K. Bártlová-Lampířová: Puteto de mia panjo	20

**Al ĉiuj membroj de nia Esperantista Klubo en Praha kaj al ĉiuj legantoj de la Bulteno
okaze de Kristnasko kaj de Nova Jaro 2007
multe da sano, bonhumoro kaj feliĉo
Deziras la komitato de la Esperantista Klubo en Praha**

Atenton!

Pozor!

La Kristnaska vespero de nia klubo okazos eksterordinare jam merkrede la 13-an de decembro 2006 de la 14-a ĝis la 16-a horo en la kunvenejo en la strato Ve Smečkách 25.

En la nova jaro niaj kunvenoj okazos denove regule ĉiuĵaŭde de la 14-a ĝis la 16-a horo en la kunvenejo en Praha 1, Ve Smečkách n-ro 25.

La unua kunveno estos ĵaŭde la 4-an de januaro 2007. Ĉiuj estas bonvenaj!

Vánoční večer našeho klubu se koná výjimečně ve středu 13. prosince 2006 místo obvyklého čtvrtku. V novém roce budou schůze jako obvykle ve čtvrtek od 14. do 16. hod., první bude 4. ledna 2007. Schůze budou ve schůzové místnosti v Praze 1, Ve Smečkách č. 25.

Vánoční literární večer spisovatelky a básnířky Věry Ludíkové bude v úterý 12. prosince od 17. hod. v místnostech PEN-klubu ve Vodičkově ul. č. 32. Verše a vánoční zamyšlení přednesou čeští umělci, v esperantu Josef Vích.

Literárně hudební pořad **Věk nadějí**, zamyšlení nad poselstvím spisovatelky a básnířky Věry Ludíkové s přednesem jejích básní i v esperantu se bude konat **ve středu 17. ledna 2007** od 18. hod. v kapli **Domova Sue Ryder** v Praze 4, Michelská ul. č. 1/7.

Novjara zdravice 2007

de Jaroslav Krolupper

Pozdvihněme vína sklenku
s novoroční zdravicí
Esperanto certe venku
ĝis nun tamen kapricis

Uplynulá slavme léta
a kulatá výročí
Ĉiam por omaĝi pretaj
por medalojn alkroĉi

Nehlasujme pro novoty
hlavně pozor na mládí
Ili ĉiam dancis fotis
la trankvilon invadis

Mladí nectí authority
zvali by nás do kola
Ni favoras ja mediti
versoj estas frivolaj

Slavit borce zasloužilé
to nám zdraví dovolí
Festi eblas pli facile
ol perfekte paroli

Jaroslav Vrchlický

Vánoce

Hlas zvonů táhne nad závějí,
kdes v dálce tiše zaniká;
dnes všechny struny v srdci znějí,
neb mladost se jich dotýká.

Jak strom jen pohne haluzemi,
hned střásá ledné křišťály,
rampouchy ze střech visí k zemi
jak varhan velké píšťaly. -

Zem jak by liliemi zkvetla,
kam sníh pad, tam se zachytil,
Bůh úsměv v tvářích, v oknech světla
a v nebi hvězdy rozsvítil.

A staré písně v duši znějí
a s nimi jsou sny jesliček
kol hlavy mé, jak ve závěji
hlas tratících se rolníček.

Můj duch zas tone v blaha moří,
vzdech srdcem táhne hluboce,
a zvony znějí, světla hoří –
Ó vánoce! Ó vánoce!

Jaroslav Vrchlický

Kristnasko

Sur neĝo sonoriloj tonas,
silente velkas en la for';
en koro ĉiuj kordoj sonas
tuŝite de la rememor'.

Se arbojn movas eta vento,
tuj falas teren neĝ-kurten',
glaci-konusoj de tegmento
similas tubojn de orgen'.

La teron kovras neĝ' sensone,
la ter' kovriĝis per lili',
rideton vange, lumen dome,
ĉiele stelojn metis Di'.

Malnovaj konatoj de l' pasinto
kun sonĝoj pri la kripa bril',
la kapon pasas, kiel tinto
de fora sleda sonoril'.

Animon feliĉego lulas,
la kor' suspiras pro l' imag',
sonoro sonas, lumoj brulas ----
Kristnaska tag'! Kristnaska tag'!

(tradukis Rudolf Hromada)

Fráňa Šrámek

Decembro

Sur pura blanka neĝ' mi iros
kun sonora lud' en kor',
al land' Kristnaska mi aspiras.
Kaj post aper' de stela glor'
Proksimos jam la cel'. Proksimos pli la cel'
dum iros mi tra arb-odor'.

Silentos mi – dormanta kordo –
kaj kiel en la knaba temp'
peltĉapon premis mi kun tordo
sub sorĉo de l' arbar-silent'.
Proksimos jam la cel'. Proksimo pli la cel'
Post ĉes' de mia plor-torent'.

Min pac' alblovos, kvazaŭ stalo
kun bov', azeno en proksim',
jen ambaŭflanke lum-vualo,
kaj ŝalmos bula nokta sin';
Proksimos jam la cel'. Proksimos, aĥ, la cel',
paŝtistoj eble konos min.

(tradukis Rudolf Hromada)

Jaroslav Vrchlický

La Kristnasko

Sonoro ŝvebas super neĝoj,
finsonas ĝi en malproksim',
la koro sonas per arpeĝoj,
ĉar la juneco tuŝas ĝin.

Se siajn branĉojn movas arboj,
glacikristaloj falas jen,
de l' domoj pendas glaci-arboj
kiel fajfiloj de orgen'.

Ekloris sur la ter' lilio,
kie ekkuŝis neĝa hel',
fenestrojn eklumigis Dio,
vangojn kaj stelojn en ĉiel'.

Enmense kvazaŭ kanto sonus,
kun ĝi pri kripoj revoj mil
ĉirkaŭ la kapo, kvazaŭ dronus
en neĝoj voĉo de tintil'.

Denove mia mens' jubilas,
kaj ĝemo iras tra la kor',
sonoroj sonas, lumoj brilas –
Kristnaska hor'! Kristnaska hor'!

(tradukis Jaroslav Mráz)

Fráňa Šrámek

Decembro

Mi iros sur blankneĝa helo
en kor' kun sonoril'.
Kristnaska ter' - jen mia celo.
Kaj dum la stel-defil'
Mi estos en proksim'. Mi proksimiĝos pli
ennokte, en malbril'.

Kaj kiel violon'senkanta,
silenta, eta, sen defed',
ĉapeton per la man' ĉifanta,
sorĉita en arbar-silent',
mi estos en proksim'. Mi proksimiĝos pli
post paŝ' trans mia larm-torent'.

Kvazaŭ el stal' kun reneto
kaj bovo paco levas sin,
lumetoj ĉie en baletto,
ekploros ŝalm' en kont-kulmin',
mi estos en proksimo. Ho, alvenis mi,
paŝtistoj jam rekonas min...

(tradukis Jaroslav Mráz)

„Laŭdire, en kristnaskaj tagoj, pli multe
malferimiĝas homaj koroj. Tion mi ne scias,
mi ne estas kardioĥirurgo.“

H. F.

Kristnaska nokturno

Ne, mi tute ne volas rakonti al vi ian kortuŝan okazon pri kompatinda, tenka, senpova avineto, kiun ekzilis ŝia propra familon en Sanktan Nokton.

Kontraŭe:

Imagu al vi maljunan, malbelan, abomenan virinaĉon, cinikan kaj netolereblan, vivantan tute en soleco:

Min...

Kiam mi vidiviniĝis, mi baldaŭ povis ekkoni ke mia familio ne bezonas min. (Eble, ke mi estus por ili akceptebla, kiel nepagita servistino.) Do, kiam mia familon ne bezonas min, mi ne bezonas mian familon. Feliĉe, mi ne timas vivi en soleco. Mi rapide forloĝiĝis en alian urbokvartalon, sufiĉe malproksime de mia amata familon, nur kun unu deziro: Lasu min en kvieto! Ĉiuj!

Tiel forpasis kvar jaroj, kaj niaj raraj familiaj kontaktoj ricevis sian regulan ordon: Kvar ĝentilecaj vizitoj jare. Interŝanĝo de kelkaj bildkartoj ĉe okazo de naskiĝtagoj. Interŝanĝo de etaj donacetoj antaŭ Kristnasko kun ilia deviga invito: - „Ĉu vi ne volas travivi kun ni Kristnaskan vesperon?“ Kaj mi, kiel ĉiam, respondas: „Ne, ne! Koran dankon! Mi jam havas mian programon!“

Ĉi tiuj vortoj ankaŭ apartenas al nia kristnaska rito. Tiel ĉio funkcias bonege. Mi povas nur rekomendi!

Ankaŭ miajn nunajn nabarojn estas necese swevere „teni de la korpo“. Nur malvarman saluton. Nenion alian. Mi ne ŝatas ilin, kaj ili ne ŝatas min.

Kun antikva filozofo Seneca mi ĉiutage konfesas: „Mi revenas hejmen pli malĝoja, pli saĝa, pli kruela kaj pli avara, ĉar mi estis inter homoj.“

Mi jam tute akceptis tiun filozofion en mian vivmanieron. Tio signifas pozon: Homoj kontraŭ mi. Mi – kontraŭ homoj...

Sed nun jam fino de mia filozofko. Mia stranga, kristnaska okazaĵo komenciĝas.

En najbara domo vivis hispanaj geedzoj. Li laboris kiel komenisto, ŝi mastumis. Ili havas ses aŭ sepjaran filinon, ŝi nomiĝas Isabela. Tiam ili vivis en nia lando pli o lunu jaron. De tempo al tempo, kiam ni hazarde renkontiĝis, la patrino de Isabela ĉiam strebis diri al mi almenaŭ kelkajn vortojn per sia malbona ĉeĥa lingvo. Ĉar mi volis resti ĝentila, mi devis aŭskulti aferojn, kiuj tute ne interesis min: ke ilia Isabela tre ŝatas danci kaj en Madrido ŝi vizitis danc-lernejon por infanoj pli ol du jarojn. Ankaŭ la malgranda Isabela volis ĉiam interparoli kun mi. Tiu tre babilema knabineto jam bone konis la ĉeĥan lingvon, pli bone ol ŝiaj gepatroj.

Mi renkontis ŝin kaj ŝian patrinon en Kristnaska tago antaŭtagmeze, ni havis por iri hejmen komunan vojon. Isabezla tuj demandis min, ĉu mi revenas el supermarketo, kaj mi certe portas en tiu skatoleto ian kristnaskan donaceton?

„Kaj ĉu vi antaŭĝojas je la Kristnaska vespero?“, ŝi demandis min naive.

Mi klarigis al ŝi, ke mi revenas el tombejo, kie mi ludis per okarino ĉe tomuto de mia edzo kristnaskajn kantojn, kiel ĉiam en Kristnasko, kaj en tiu skatoleto mi portas la okarinon, kaj ke mi festas Kristnaskan vesperon sola.

„Sed tio devas esti terura, resti sola en Kristnaska vespero! Mi certe mortus, kiam mi devus esti sola!“ ekkriis tiu temperamenta infano.

Mi certigis ŝin, ke mi jam scias esti sola, ke mi ne ploros, ĉar mi estas tre kuraĝa. „Mi, vestita en longan robon, vespere aŭskultos kristnaskan koncerton, kaj post malpeza vespermanĝo mi partoprenos meznoktan meson,” mi ankoraŭ aldonis.

Sed malgraŭ mia certigo Isabela restis malĝoja kaj malkontenta. Ŝia patrino tuj invitis min al kristnaska vespermanĝo, sed mi kun dankoj rifuzis tion. Mi ne bezonas varmiĝadi ĉe fremdaj fajroj...

Estis posttagmezo.

Mi jam havis kristnaske ornamitan mian malgrandan apartamenton, kaj vestita en bela vespera robo mi ekflamigis ĉie multajn kandletojn (neniun lustron), kiel ĉiam en Kristnaska vespero.

Jam mallumiĝis. Ĉe mia pordo iu sonorigis.

Mi malfermis - - kaj sur mia sojlo staris Isabela kun sia patrino!

„Señora, ĉu ni povas eniri?” demandis Isabela.

„O, jes! Mi petas, nur eniru!”

Kaj Isabela kun sia patrino eniris.

„Mi elpensis por vi kristnaskan donaceton, ĉar vi estas tiel sola en ĉi tiu vespero,” diris Isabela, kaj ŝia patrino demetis de ŝi ŝian peloton. Nur nun mi povis vidi, ke Isabela havas belegan, hispanan nacian veston.

„Señora, nun mi dancos nur por vi,” ŝi diris al mi kun ekrideto.

Kaj Isabela komencis danci. En manoj kastanjeton, ŝi dancis hispanan nacian dancon „flamengo“-n! Tute perfekte, en freŝa ritmo de tiu muzikilo, malgraŭ tio, ke estas tre malfacile per fingroj kaj manoj ludi kastanjeton – kaj samtempe danci. Sed la malgranda Isabela konis tion eminente.

Isabela ĉesis danci. Mi vane serĉis vortojn. Mi nur klinis la kapon kaj silentis. En tiu momento mi ekkonis, ke mian krustiĝintan koron ektuŝas la mano de anĝelo.

Tiam min, fieran maljunulinon, humiligis tiu infano ĝis profundo de mia estaĵo.

Niaj rigardoj renkontiĝis. Brilega ekrideto de Isabela plenigis min per mirego, same, kiel ŝiaj vortoj: „Señora, mi ankaŭ alvenis por diri al vi, ke mi amas vin!”

„Isabela, mi neniam forgesos vian belegan donacon,” mi fine estis kapabla mallaŭte diri, kaj mi enmanigis al ŝi unu el miaj kristalaj kandelinoj:

„Mi petas, akceptu ĝin, kiel mian dankon.”

Poste, de ŝia patrino mi ricevis vinberaron, tiel grandegan, ke mi ankoraŭ neniam vidis similan. - -

De tiu tempo jam forpasis jaro.

Mi denove festos Kristnaskon. Denove en soleco, kiel antaŭe.

La malgranda Isabela antaŭ nelonge revenis kun siaj gepatroj en sian sunplenan patrujon...

Tamen mi, de tiu Kristnaska vespero, ĉiam, al ĉiu mia saluto, aldonadas ereton de ŝia brilega ekrideto. Nur ami homojn, kiel ŝi, mi ankoraŭ ne scias.

Sed en mian kristnaskan meditadon mi enmetos vortojn de mi preĝo: „Bona Dio, mi petas vin, donu al ni, homoj, pli multe da amo – unu al alia!”

Redaktor Bultena obdržel tento krásný dopis:

Vážený pane Patero,

Prosím přijměte moji upřímnou omluvu, že jsem Vám nepoděkovala za zaslané zářijové Bulteno s Vaším krásným a obsáhlým článkem o naší rodině. Jsem Vám za to velmi vděčná. Při příležitosti vydání knížky Taglibro de mi frato v několika různých jazycích jsem byla hodně v cizině.

Chtěla jsem Vám napsat esperantsky, ale stále jsem to odkládala, protože ačkoliv esperantsky rozumím, vyjádření mi už působí námahu. Od svého dětství, když naši rodiče mluvili mezi sebou a někdy s námi dětmi esperantsky, jsem esperanta nepoužívala, čehož dodatečně lituji.

Jen malou epizodu pro zasmání: Jednou, bylo mi tehdy asi pět let, před tatínkovými narozeninami se se mnou maminka radila, co by mi měla koupit na narozeniny. Poradila jsem jí: „Kup tatínkovi Bulteno, to on má nejradši!”

Mi salutas vin kore,

Chava Pressburger – Ginzová.

Zdenka Bergrová

Infanoj de la respubliko

(Daŭrigo)

Aparta kazo de nia grupo estis Jiří-František, li vivis dum la tuta milito eksterleĝe. Kaj li sola tre elrevigis nin. Tial mi ne konigas lian familiant nomon, li estas elmigrinto, konata kaj estimata, kiu ne prezentas sin kiel konato de siaj tiamaj kamaradoj, kiuj ŝirmis lin kaj poste suferis pro tio. Iuj provis kontakti lin, li preteriris sian – mi anticipas – ĉefredaktoron de MF 45 – kaj li mienis, ke li ne vidas lin. Li kaŝis sin plej ofte ĉe Olda en la Malgranda Urbo kaj ĉe Pavel ekster Prago. Dum ia tempo ankaŭ ĉe ni, miaj gepatroj estis sentimaj homoj. Jiří-František ne. Mi akompanis lin, kien li bezonis, li diris, ke en duopo li estas malpli okulfrapa. Mi havis hele kaŝtankoloran hararon, la nazon nepre rektan, li estis malhelhara... Foje ni luis ŝipeton sur Žofin-insulo. Mi kulpiĝis, ke mi ekbalancis ĝin, li volis kvietigi ĝin, se ho ve, ni ambaŭ falis en la akvon. Tio okazis proksime de la bordo, da akvo estis ĝistalie. Mi ridis pro tio, sed li ne komprenis, ke li estas okulfrapa ĝuste pro tio, ke la aferon li juĝis serioze, li faris al mi scenon. Li sciis, ke ĉe niaj gepatroj ni seklos, sed lia mallaŭta lamentado ne havis finon. Mi ekkonsciis, ke mi meta sen danĝeron miajn kuraĝajn gepatrojn, la dekkvinjaran Jarmilan, ke en la domo estas malfavora situacio, ĉar tie loĝas ĉeĥa-germana familio, la kapo de la familio estas la edzo, ĉeĥo, kiu portas hokokrucan sur roverso. Kiam ajn mi estis iun el ili renkontonta sur la ŝtuparo, mi strebis kaŝi min en alia etaĝo kaj atendi, ĝis ili foriros.

Ne estis sufiĉe da tio. La najbarinoj, ĉefe sinjorino Julka, kutimis enkuri en nian kuirejon el antaŭĉambro sen invito, foje tiel malkaŝiĝis la ĉeesto de Jiří-František. Kaj tuj la sekvan tagon demandis mian patrinon alia najbarino, sinjorino Růžena, ĉu mi edziniĝos... Panjo penis por elturniĝi. Ambaŭ najbarinoj estis fidindaj ĉeĥinoj, ke Jiří-František estas ĉe ni kaŝata antaŭ gestapo panjo memkompreneble ne diris al ili, eĉ ne estis timo ke li povus tion diveni, kaj eĉ estus pli bone, se ili divenus, sed ilin ambaŭ interesis pli vere mia imaga edziniĝo. Kun la germanino en la domo ili ne tenis rilatojn, sed – estas diversaj hazardoj, la diablo neniam dormas.

Mi diris al Jiří-František tion, ke en nia domo loĝas ĉeĥa-germana familio, nenion alian, li ekkomprenis, ke tranoktadi ĉe ni estas danĝere kaj li rezignis pri tiu ĉi kaŝejo. Olda kaj Pavel lin kaŝadis plu.

Mi scias de Pavel, kiel tio okazis, sed tiun ĉi epizodon decus rakonti al Olda aŭ Pavel, nu mi eble scias de ili ambaŭ tiom, ke mi ne konfuzos ĝin.

Jiří-František en iu oficejo, kvankam ĉeĥa, sed subordigita al germana inspektoro kiel validis ĝenerale, legitimis sin per identigilo de Pavel. En protokolon li diris la nomon de Pavel kaj adreson, per la indentigilo li nur ŝvingis. En sengarda momento li ŝtelis stampilon kaj bonŝance foriris. La Delon oni malkovris kaj Pavel estis alvokita. Montriĝis, ke Pavel ne similas al la junulo, kiu prizorgis ian aferon en la nomo de Pavel. Pavel estis fortulo, Jiří-František kompare al li subtiluleto. Post kiam Pavel ne emis konfesi ion, pri kio li eĉ ne sciis, ke ĝi okazis, oni transdonis la enketadon pli alten. La afero aperis eĉ ĉe gestapo kaj la alvoko al tiu ĉi institucio Pavel revenis du monatojn post fino de la milito.

En koncentrejo li rekontiĝis kun Olda. Ankaŭ li ne estis bubo neŝancelebla, sed oni ruinigis lin, li volis ĵeti sin sur la dratojn ĉirkaŭ la lagero, en kiuj estis alttensia elektro. Pavel sukcesis haltigi lin kaj kuraĝigi. Ili kune trapasis la mort-marŝon. Olda ne sekretigis, e li ne sukcesus finiri, se Pavel ne subtenus lin.

Tio estis memkomprenebla. Mi estas konvinkita, ke ĉiuj ceteraj kiam ajn donus sian vivo unu por alia. Mi ne povas kompreni, ke pli poste, post la renverso, la buboj povis stari unu kontraŭ alia hirtiĝintaj virkokoĵoj. Per tio ili kaŭzis, ke mi rifuzis al Anna Marie kaj Pavel verki komune kun ĉiuj rememorojn pri la milito.

Tiam ankoraŭ vivis Olda, la ĉefa gastiganto. Bedaŭrinde li kontraŭstaris al Jamarius. La kialoj estis privataj, sed Jamarius estis avantgardisto sur la indekso, Olda rekonata poeto. Mi havas skrupulojn, ke mi ne trovis solvon. Nik, kiuj restis ekster iliaj neeble konfuziĝintaj rilatoj, devis iel aranĝi, ke ili verku aparte. Anjo siajn rememorojn skribis laŭdire koncize kaj sublime. Ivan Andrenik amplekse kaj detale. Pavel havas iliajn tekstojn forkaŝitajn ie en sia vasta ĥaosa arovo. Mi ne scias, kion ili notis... Neniam, neniam plu ni estis unu grupo.

Al ĉio post jaroj enmiksiĝas al mi en la nombron la konservatorianoj, ili ankaŭ formis propran tuton. Tiun kaŝkonservis en Cibulky en la kvartalo Košíře la brava patrino de Dáda sinjorino Anna Hrubá, la vidvino post ekzekutita patriota ĵurnalisto. Foje, miaopinie en la jaro 1943, akompanis Dáda siajn samklasanojn, proksime de la Plzeňská-avenuo li suprengrimpis sur stratlanternon kaj elkriis „Vivu Ĉeĥoslovaka respubliko“.

La protektorka ĝendarmo kaŝis sin post angulon de transversa strato...

Al ni apartenis Jirka Šotola, pli poste li dizertis de dram-roloj inter glorajn poetojn... La ceteraj restis ĉe aktorado, iuj elstaris, aliaj ne...

La sortoj de protektorataj kamaradoj estos pli poste tre malsamaj, ekzemple Zdenek la luministo finstudis medicinon, fariĝis kuracisto en Kašperské Hory kaj pacientojn li vizitadis ĉevalrajde. Plejparte ili atingis elstarajn postenojn. Anna Marie, ankaŭ kuracistino, zorgis pri endanĝerigitaj infanoj en la tuta respubliko, ŝia proksima kunlaboranto estis rara homo, PhDr. Zdeněk, fame konata infan-psikologo, ankaŭ li estis interligita kun ni, Božík estis direktorko de Asocio de ĵurnalistoj, Jindra direktorko de Teknika libroeldonejo, Vašek kaj unu el Georgoj famiĝis kiel pentristoj, plua Georgo kiel direktoro de Nacia galerio, Vladimír estis direktoro de Instituto de marks-leninismo, la pianisto Zdenek fariĝis diplomato, ambasadoro sinsekve en kelkaj ekzotikaj ŝtatoj, Mirek baldaŭ akiris ŝtatspremion kiel kemiisto, sed apud la monumento de Stalin li tridekjara mortigis sin mem. Tiel finis sian vivon ankaŭ la longforma instruistino Anka. Aliaj estis elstaraj aktoroj, verkistoj, poetoj, tradukistoj – kun la militsekvoj ili kvitlis, nur Joĉjo, la granda infano kun iom misforma kapo, fariĝis la plej granda viktimo el ĉiuj militkaptitoj de nia grupo, li mortis en 1946, ĉar en koncentrejo SS-anoj trakikis liajn renin.

Unu tagon antaŭ lia morto mi sidis kun lia patrino kaj kun Jiřina Malíková nelonge ĉe lia lito.

Post arestado la grupoj formiĝis ĉiam denove. Ankaŭ la nia. Božík Svoboda kaj la nekaptebla Jan Kopecký aranĝis malnovĉeĥajn barokajn ludojn. Ni revenis per ili en Malgrandan Urbon. Božík estis arestita kaj enprizonigita, komence en Pankrác, de kie li sendis al mi la unuan kaŝleteron. Kun lia patrino mi poste portadis por li tolaĵon en la prizonon. Ili translokigis lin en Malgrandan Fortikaĵon en Terezín. Ankaŭ de tie li sendis kaŝleterojn.

La kaŝleteroj de Božík...

Vláďa Ruml venis por adiaŭi nin, eble eĉ por interkonsiliĝi, kion li faru. Li havis invitilon al gestapo. Li loĝas ĉe sia estonta bopatrino, lia Lenka havas ankoraŭ fratinon, kiel do li povus subteriĝi. Ne eblis eskapi. Li iris kaj revenis post la milito.

Mi havis apartan rilaton al Standa. Li kuraĝigadis per proklamoj, ke kiu lasas sin aresti, tiu mem ion fuŝis. Ĝi ne estis vero, sed ĝi impresis. Foje io min instigis, ke mi iru al li al Košíře.

Mi do iris redoni al li ian libron, aŭ mi ne plu scias, kion mi elpensis. En lia hejmo estis nur liaj gepatroj, la patrino ploris, antaŭ momento oni arestis lin kaj forkondukis. Eble post tri semajnoj mi iris demandi ilin pri Standa. Lia patro diris, ke antaŭ momento Standa senprezare forveturis en kamparon, por iom refortiĝi, nur antaŭ unu horo li revenis. Kaj li sciigas al ĉiuj kamaradoj, ke ili nenie alparolu lin, ke li mem nenium el ni konas kaj ke ni ne konas lin.

Post mallonga tempo mi iris bani min sur la insuleton en Podolí. Tiutempe ĝi ne estis tiom surkreskita kiel nun kaj la vultava akvo tiom malpura, ĝi estis pli bona ol ekster Prago, post Košíře. Mi trovis tie la fratinon de Standa, ŝi ploris, ke Standon oni arestis denove. Li revenis nur longe post la milito.

Tra koncentrejoj kaj morto-marŝoj trairis ankaŭ pluaj, Zdeněk, Ráďa... ĉiu de alia loko, ĉiuj revenis peze trafitaj por longa tempo..

Fine engrupiĝis kvar forlasitaj knabinoj, Evamarie, vivanta sub fremda nomo Blahníková, Stella Zázvorková, Dunka Pichová kaj mi. Ni ne sopiris al amuziĝo, ni konkuris en intence neebla vestav. Malgajaj ĉe tio ni ne estis. Kion tio helpus.

Grupo da buboj je kvin jaroj pli junaj, la kamaradoj de Petro, la frato de Dunka, veturis devigate fosi tranĉeojn. La naskiĝintoj en la jaroj dudek unu kaj dudek kvar estis devigitaj sklave labori en la Regno.

La tiutempa kamaradino Ljuba Skořepová min alprenis en la grupon de Josef Pehr, kiu ludis per gantpupoj por plenkreskaj spektantoj. La gantpupojn mi manipulis kaj kelkajn kudris. Vane mi aspirin, ke apud la besto, kiun mi kondukis, mi estu sur afiŝo menciita per la nomo. Ekzemple apud kamelo. Ĉiujn teatraĵojn verkis Josef Pehr. Mi enmiksitis min en lian metion kaj verkis por infanoj kaj por gantpupoj versan teatraĵon en praga dialekto. Mielkukan dometon. Ĝi estis iom ŝanĝita, troviĝis tie afabla maljunulino Mizero. Josef Pehr tiam ankoraŭ ne havis Joĉjon kaj volis ludi nenion por infanoj, mian fabion li ne surscenigis. Sed kun tiu ĉi grupo mi venis en la taĉmenton de Jindřich Honzl.

La reĝisoro Jindřich Honzl vivis en subtera kaŝiteco. Li loĝis en humida teretaĝa loĝejo en domo ĉe bazo de Malnovaj kastelŝtupoj. Labori li ne rajtis, sed laboris. Kun studentoj de la konservatorio li preparis „Instruisto kaj Levanto“ de Vančura. Ankaŭ en tiu ĉi grupo estis la estontaj elstaraj kultur-laborantoj, precipe aktoroj, pli poste famiĝis ekzemple Vladimír Ráž.

La rolon de la instruisto Honzl komisiis al Josef Pehr, por la Levanto li dresis Dadon. Li estis la unusola reĝisoro, kiu Dadon (propranome Vladimiron) devigis klare pronaci poezian tekston kaj fari moviĝojn laŭ aparta – preskaŭ surrealistika koncepto. Aŭ ĉe de la koncepto de Devětsil?

Kiam la milito finiĝis, Honzl formis el tiu ĉi grupo Studion de la Nacia Teatro. Mia fraŭlina nomo troviĝas en la unua listo de la membroj de la Studio. Jindřich Honzl proponis al mi, ke mi fariĝu lektor opor teatraĵkonceptoj. Sed mi celis al la ĵus malfermita Karola Universitato, mi respondis, ke mmi prefere studus la ĉeĥan kaj rusan literaturon. Li aprobis tion. Tiel ankaŭ okazis, ke mi troviĝis ekster la establa organizaĵo de la Komunista partio en la Nacia Teatro, en kiun oni akceptis ĉiujn membrojn de la Studio.

Mi restis senpartia.

Preskaŭ mi forgesus la tiom gravan akton de la vivo de Levanto, kia estis la maturecekzameno. Ĝi estis antaŭ la studoj ĉe Jindřich Honzl kaj ankaŭ antaŭ la bonŝanca renverso.

Mi ne scias, per kia sorto-proceduro aŭ de instruista postscenejo – pri la ĉeĥa lingvo nia klaso ekzameniĝis pri Fráňa Šrámek. En Ars mi kulpis pri lia vesperprogramo...

Ni iris inviti lin, alportis florojn, sed li ne akceptis nin. Neniun li akceptis, nenion li vizitis, li nur sciigis, ke ni ĝojigis lin kaj ke tiun honoron li ŝatas.

En la unua momento mi eklarmis, kiam dum la ekzameno mi ricevis la taskon analiti lian poemon. „Se mi estus ĉeval-paŝtisto“. La poemo de Šrámek estas kontraŭmilitaj, ni legis ilin tiel ĉiujn kaj tio estis dum la milito... Mi citis „ĉevalojn mi alvokus de malsekaj valebenejoj, la ĉevaleto blanka kaj belega, mir-mire, staras ĉi tie subite kaj per homa voĉo ĝi alparolas min...“ kaj versojn el la poemo „Raporto“... „ĉu ebele scias mi pri argumento, kial mi kuŝas kun truita ventro, kaj por ĉevaloj mi indulon petas, la best´ terure la demandojn metas, kial ĝi ne rajtas vivi... Per malĝojega henado kvazaŭ la aero ĉirkaŭe sonus, ĉevaleto blanka...“

Ĉar la ĉeĥlingvan ekzamenon trapasis nia tuta knabina klaso sen asistado de la terura asesoro, la germano Werner, ĉiuj sukcesis bone. Ankaŭ mi. Mi ricevis por la blanka ĉevaleto la noton eminente kun steleto. Por la germana ekzameno la sinjoro Werner venis. Mi scipovis parkete la artikolon Asocio de germanaj knabinoj. Tio neniel helpis min. Li ion demandis demandis germanlingve kaj mi tute ne ekkomprenis...

Mi ne fiaskis pri la germana sola, ĉiuj kvar knabinoj, kies vico sekvis laŭalfabete, cedis al la sorĉo de liaj germanaj demandoj, ĉiuj ni devis ripeti la ekzamenon. Miaopinie ie ĉi tie komenciĝis tio, pri kio dum mia tuta plua vivo mi diras „kun la skrapvunditaj oreloj“. Ĉiam mi aperis aŭ mem eniris en cirkostancojn, kie mi povis rompi ambaŭ kruojn, sed mi rozpis nur unu.

La asesoro Werner al ni kvar fuŝis la libertempon, oni diras pri ĝi la plej bela, la ripara ekzameno okazis nur post ĝi. Sed pri tiu ekzameno estas mia rememoro hela.

Mi enpaŝis en klasejon kaj sur katedro sidis neĵuna viro kun senlime malgajaj okuloj. Momenton mi silentis, ŝajnis al mi, ke li esperige silentis kaj tial mi nervoze elbuŝigis, ke tiun *Bund dojĉr Medl* mi scipovas parkere, ke mi tion rapide diros. Li nee skuis la kapon, ke li ne volas. Post tio li demandis min germane, kiel mi nomiĝas. Tion mi sciis. Li ekrigardis tra fenestro, subskribis ion surtable kaj diris, ke mi sukcesis, ke mi rajtas foriri. Subite mi ne emis. Nur post sekundo mi ekkonsciis pri mia bonŝanco, dankeme mi ekridetis kaj iris al la pordo. Ankoraŭ mi turnis la kapon, ŝajnis al mi, ke ankaŭ li ekridetis. Li estis profesoro Siebenschein.

(Finota)

(tradukis Jiří Patera)

Zdenka Bergrová

Lago de Mácha

Lago de Mácha
sub pezo de raketoj
tempestan akvon etendas
kiel la politiko monaĥa
Ne eblas fuĝi en impetoj,
la sociala kredo en ĝi suferas.

Aĥ, ĉeĥajn balotantojn,
sub pezo de raketoj
fulme trafis kapitalo,
kaj ili legante en gazetoj
ne komprenas la kialojn.

Raketoj havas povdistancon.
Se prefere ĝi ne estus stabila.
Kie ili estas, kie ili havas kancon
Hynek, Vilém, Jarmila ...

Mia amo, vi labilas
kaj suferas pro la surdo.
Kien la pordet' kondukas
ŝlosfermita per mallumo.

Ekzistas vere bonaj homoj,
en la mond' majoritato,
sed venas temp' de rabaj uloj
kaj regas ĉi minoritato.

Ŝtelis la katedralon
kapitalista juĝistaro,
la eklezio laŭdas Dion,
simplaj homo jen koŝmaro.

(trad. -jpa-)

Čestmír Vidman

Fablo

Al roĵo venis lupino. Antaŭ ol trinki, ŝi rigardis longe plaĉeme sian bildon kreitan de lumreflekto sur la akvo. Kelkfoje ŝi lekis siajn lipojn. Poste ŝi deŝiris kelkajn rubusberojn, kiuj estis flanke sur la bordo kaj zorgeme ŝi surŝmiris ilin. Poste ŝi denove plaĉeme ekrigardis la spegelnivelon de la roĵo. Subite ŝi ekrimarkis, ke ŝin scivoleme rigardas rafido.

Ŝi vortatakis ĝin: „Kial ci ĝenas min ĉi tie, ci needukita rafido. Jam unu jaron ci ŝlimigas ĉi tie la akvon. Kaj min kolerigas, ke ci ĉi tie konstante narcisisme rigardas cin sur la akvo, kvazaŭ ci estas la centro de la mondo. Ĉu ci opinias, ke ĉiuj aŭskultos cian perpleksan beladon kaj ke ci estas la centro de la mondo?”

„Pardonu, estimata sinjorino lupino, sed kiam mi estas trinkanta, mi havas stvole mian bildon antaŭ la okuloj. Sed alikaze sur la akvon mi ne rigardas kiel en spegulon, por poste per rubusoj kolorit miajn lipojn. Kaj la akvon mi ne povas ŝlimigi al vi, ĉa la fluo iras de via l mi kaj ne inverse. Ankaŭ tio ne povus okazi dum unu jaro, ĉar mi naskiĝis nur ĉi-jare printempe.“

La lupino ekindignis: „Do ci ankoraŭ kontraŭparolos al mi. Tio ja estas impertinentaĵo. Kaj la plibonigado de mia beleco entute ne koncernas cin. Ci parolu, kiel ci volas, mi tamen formanĝos cin.“ Kaj ŝi ĵetis sin sur la ŝafidon. Nur krako eksonis. Kaj la lupino koleus: „Pro la needukito mi ankoraŭ damaĝas la freŝe kolorigitan buŝon.“

„Do infanoj, kion vi diras pri la malnovega fablo?” demandas praavino.

„Al mi tio ne plaĉas, ĝi estas tre malbona“, dira la kvinjara pranepino.

„Kaj al mi ankaŭ ne, ĝi estas tre kruela,“ kompletigas la dekjara nepo.

„Miaj karaj infanoj, vi devas ekkonscii, ke la vivo iam estas efektive kruela. Neniun ĝi karesas. Kaj kredu, ke dependas de vi, ĉu via vivo subtenos la bonon.“ Kaj la avino kisis siajn genepojn per la sekiĝintaj lipoj, kiujn neniun plibonigi kelkfoje tage per ruĵo. Ŝi ne volis esti la centro de la mondo, kiel la virinoj, kiuj senĉese narcisisme observas sin en speguleto kaj plibeligas sian aspekton. Kie erare ili supozas, ke nur kun tiu ĉi adaptor ĉio moviĝos ĉirkaŭ ili.

30. 5. 2006

(tradukis J. Patera)

Čestmír Vidman

Kanario

Kiam en vojaĝoficejo oni proponis al mi vojaĝon al Kanariaj insuloj, mi ne rezistis kaj flugis tien kun ilia ekskurso. Tie estis ĉie multe da kanarioj. Kaj kun multaj el ili mi povis paroli ankaŭ ĉeĥlingve, eventuale slovakingve, ĉar la tieaj kanarioj estas tre saĝaj kaj lernemaj kaj de multaj niaj turistoj ili ellernis eĉ nian lingvon. Se vi demandas tian plum kovriton, kiu malsovaĝe sidiĝas sur mian manon, kiel ĝi fartas, ĝi respondos. Dobřře (Bone). Tiu nia ř tamen kaŭzas al ĝi malfacilaĵojn. Cetere en la slovaka tiu respondo estas en ordo.

Kaj kiel mi akiris la kanagon, kiun mi havas nun en Prago? Mi aĉetis por mi fruktojn ĉe la plaĝo kaj la vendisto anstataŭ redoni monerojn dediĉis al mi tiun ĉi flavan birdeton. Ĝi tuj sidigis sin sur mian ŝultron kaj iris kun mi en la hotelan ĉambron. Antaŭ tio mi ankoraŭ aĉetis kaĝeton, por ke ĝi havu adekvatan loĝigon. Sed la kaĝo estas konstante malfermita, por ke ĝi povu iam ajn elflugi. Kaj mi scias, ke ĝi ĉiam revenos. Ĉe mi ĝi ĉiam havas preparitan novan nutraĵon kaj ĉiutage freŝan akvon. En unu pelveto pro trinkado kaj en alia por baniĝado. Ĝi estas tre purema kaj ĉiutage matene ĝi banas sin. Sed ĉiam en la lok opor tio destinita. La alian peloton ĝi havas sole por trinkebla akvo. Kaj ĝi estas ordema. En angulo ĝi havas sian necesejeton, tien ĝi regule venas en kazo de neceso. Ĝi ne malpurigas neglekteme la tutan kaĝon. Mi provis paroli al ĝi ĉeĥlingve. Ĉion ĝi komprenis kaj mi povis kun ĝi ĝuste interkonsiliĝi pri kio ajn. Kiam ĝi sidis sur la sidostangeto, mi demandis ĝin vespere antaŭ dormado, kiel ĝi tion faras, ke ĝi kapablas (sur tiel malstabila loko) perfekte sidi eĉ en la dormo. „Mi eĉ ne scias, mi simple eksidas tie kaj pri nenio mi zorgas.“ Ni iradis kune en la ĉirkaŭaĵo.

Sed du semajnoj de mia restado forpasis tre rapide kaj estis tempo por prepari min por la reveno. Mi esploris, ĉu estas eble kunpreni la kanagon en kaĝo kune en aviadilon. Sed postulis tio multajn formalaĵojn Kiam Pepe trovis (vidu, nur nun mi prezentas la nomon, kiun mi atribuis la ĝi), kiom da komplikaĵoj akompanis tion, ĝi surprizis min per informo, ke ĝi flugos memstare. Ĝi volas neniujn favorojn de iu. Mi persvadis ĝin ne fari tion, ĉar al ni estas granda distanco kaj por ĝiaj malgrandaj flugiloj tio estus konsiderinda penzo. Ĝi respondis al mi, ke ĝi kutimas konstante flugadi inter la centoj da lokaj insuloj, kaj ke ĝi tion kapablos fari. Ni do pristudis mapon de la suda kaj cenra Eŭropo kaj fine ankaŭ la detalan planon de Prago, kie mi markis al ĝi la straton kaj domnumeron. Mi loĝas en antaŭurbo en oka etaĝo. Ĝi kapbalancis, ke ĝi tion komprenas, ĝi scipovas kalkuli ĝis dek. Sed por ĉiu kazo mi atentigis ĝin, ke ĝi estas tria etaĝo de supre kaj ke ĝi tie post la alflugo ekfrapu sur fenestron. Kiam ĝi adiaŭis min ĉe la ŝtupetaro de la aviadilo flugante ĉe mia kapo, mi sentis min ne en ordo, ke mi tiel forlasas ĝin, sed ĝi ekpepis: „Ne timu, ĉion mi plenumos.“

Post kiam mi revenis en Pragon, mi pritaksis, kiom longe povas tiu kuraĝa bileto flugi en la centran Eŭropon. Certe tio dependas de vetero kaj favoraj cirkostancoj, sed eble, se ĉio bone progresos, ĝi povos esti ĉi tie proksimume unu monato. Mi preparis por ĝi jam novan, belegan kaĝon kaj malantaŭ la fenestron mi fiksas afiŝon kun sago, por ke ĝi pli facile orientiĝu. Mi ankaŭ ĉiutage preparis tie birdonutraĵon kaj freŝan akvon, por ke ĝi plifortigu sin post la longa vojaĝo, se mi ne estus hejme. El la laboro mi hastis ĉiutage posttagmeze rapide hejmen. Kaj apenaŭ mi eniris en la ĉambron komence de la kvina semajno, mi jam aŭdis ĝian frapadon post la fenestro. Pro nia renkontiĝo ni ambaŭ tre ĝojis.

Poste ĝi matene akompanadis min ĉe aĉetado. Sed en butikon la birdoj (samkiel la hundoj) ne rajtas eniri. Mi diris al ĝi: „Pepe, mi ne alligos vin ofende je krureto al balustrado. Flugadu ĉi tie ĉirkaŭe kaj ĉi tie ni denove renkontiĝos.“ Kio okazis kaj Pepe ricevis de mi ĉiam ian frandaĵon.

Foje mi alportis al ĝi el diskovendejo ankaŭ sondiskon kun la kanzono „Mi havas naŭ kanariojn“. El muziko ĝi plej multe ŝatis ĝin. Ĝi kantetis ĝin senĉese. Verŝajne ĝi ankaŭ nostalgiis pri siaj kunuloj. Kaj tial mi komencis iradi kun ĝi en zoologian ĝardenon al birdejo. Kaj ĉi tie ĝi ŝatis komuniki kun aliaj kanarioj kaj kanariinoj. Ĝi jam konis la vojon ĉi tien kaj tial ĝi ofte flugadis ĉi tien sola. Dumvoje ĝi haltis iam ankaŭ ĉe teniskortoj „Na Štvanici“ kaj aŭdis, ke tie iu knabino ploras, kvankam ŝi ricevis dufoje kanagon, sed kio en la teniso signifas malvenkon ses je nul en unu serio.

Jaroj pasis kaj jam forpasis (kiel la kanarioj en la kanzono). Pepe estis ĉiam pli enpensiginta kaj pli malgaja. Ĝi nostalgiis pri la naskaj Kanariaj insuloj. Kaj foje ĝi surprizis min per sciigo, ke ĝi volus flugi denove inter siajn samlandanojn. Ke li restos tie dum kelkaj semajnoj kaj denove revenos. Mi komprenis ĝian hejmsopiron, sed mi atentigis ĝin, ke ĝi jam estas maljuna kaj ke ĝi estos granda fortostreĉo, ke ĝi ĉion ankoraŭ pripensu, ĉi tie ja nenio mankas al ĝi. Sed estis vane. Kaj tial kun peza koro mi preparis ĝin por la longa vojaĝo. Sur la kolon mi alligis al ĝi karteton kun mia praga adreso eĉ kun telefonnumero. Ni ŝvingis al ni reciproke longe, ĝis kiam ĝi malaperis ĉe la horizonto. Mi taksis, ke ĝi povus reveni eble post kvaronjaro. Sed forpasis jam la kvara monato, poste la kvina kaj la sesa. La belegan someran veteron anstataŭis la aŭtunaj pluvtagoj kaj Pepe nenie. Eble ĝi kaptiĝis dum la transflugo de Italio en densajn retin, embuske etenditajn al similaj birdetoj kantuletoj, kiuj finiĝas sur teleroj de italaj frandemuloj. Sed la trejnita korpeto de Pepe eble ne tro bongustis a lili.

Mi rememoras kaj komence de novembro mi bruligas kandelon ĉe la fenestro. Dum tio ĉiam funkcias mia malnova gramofono kun la praga ŝlagro pri naŭkanarioj. Kaj al mi sufiĉus unu en mia soleco.

Jindřich Ondráček

Miaj lingvaj spertoj

Mi volas diri al vi miajn opiniojn kaj spertojn, kiuj rilatas al esperanto.

Eble mi povus komenci per konata frazo: „Kiom da lingvoj vi konas, tiomfoje vi estas homo.“ Koni la lingvon. Al mi ne estas tute klare, kion signifas koni la lingvon.

Certe ne nur unufoje ĉiu el vi plenigis punktojn de diversaj demandiloj, kie estis ankaŭ demando: kono de lingvoj. Ofte oni ankaŭ dividas la konon je kono aktiva kaj pasiva.

Ĉu iu el vi povas difini aktivan konon de la lingvo? Estas eble ellerni la lingvon kaj fari ŝtatan ekzamenon. Tio signifas, ke oni ekzamenas la kapablecon paroli, skribi, oni ekzamenas la gramatikon, originalan literaturon en la ekzamenata lingvo, eventuale oni ekzamenas la historion kaj konon de la lando aŭ landoj, kie oni la lingvon parolas. Jen, la ekzameno finiĝas bone. Ĉu la ekzamenita homo konas la lingvon? Ĉu sufiĉas, se eventuale antaŭ la ekzameno la ekzamenata homo povas pasigi ekzemple duonjaron eksterlande por praktiki la lingvon?

Mi dubas. Kial? Ankaŭ mi vizitadis en lingva lernejo germanan kurson dum kelkaj jaroj. Ordigante antaŭ nelonge miajn aĵojn hejme, mi trovis kelkajn kajerojn kun la ekzercoj kaj kelkajn kajeretojn kun la vortoj el la lingva lernejo.

Ĉar parte mi vizitadis ankaŭkonversacian kurson, estas en la kajeretoj vortoj, esprimoj aŭ frazoj de la parollingvo. Mi prenis sufiĉe ampleksan vortaron kaj jen, vortojn uzatajn en parollingvo mi parte ne trovis en la vortaro.

Same estas en la ĉeĥa lingvo. Se ni parolas neoficiale, inter la amikoj, ni uzas esprimojn tute kompreneblajn al ni ĉiuj, sed en la literaturo ni verŝajne ne trovos ilin. Kaj se iu fremdulo, aŭskultante nian parolon, eĉ se li komprenus la uzitajn vortojn, li ne komprenos la enhavon. Ĉar krom alia signifo de uzraj vortoj, ofte la frazo en amika dialogo ne havas eĉ logikon. Ĉu ankaŭ tio ĉi ne apartenas al la kono de praktika lingvo? De kie ellerni tiel bone la lingvon. Ni mem ja aktive lernis la gepatran lingvon kelkajn jarojn de la infana aĝo, kiam la cerbo estas plej kapabla akcepti multon da novaĵoj.

Krome, respondu vi ĉiu al vi mem. Ĉu vi konas la ĉeĥan lingvon? Mi mem diras, ke mi ĝin ne konas. Kiu el vi konas bone la ĉeĥan gramatikon? Ĉu vi ĉiuokaze scias, kiam skribi *i*, kiam skribi *s* aŭ *z*, kiam uzi komon, dupunkton, punktokomon, kio estas konjunkcio, subjunkcio, predikativo ktp.

Verŝajne sufiĉas, se ni povas interkompreniĝi, kaj ni konas la lingvon.

Kiom da homoj lernas fremdajn lingvojn en la lernejo, en diversaj entreprenaj kursoj, en kursoj de kulturdomoj, en lingvaj lernejoj, private, kaj ekzistas ankaŭ soluloj. Ĉu la rezulto estas sukcesa? Mi havas spertojn el lingva lernejo.

En la unua klaso estas 25 aŭ 30 lernantoj. La kurson vizitas ĉirkaŭ 15 lernantoj el ĉirkaŭ 20, ĉar parto de la lernantoj la lernejon vizitas neregule. Se la baza kurso daŭras kvin jarojn, en la 5a jaro restas ĉirkaŭ 5 lernantoj. Tiel estas almenaŭ ĉe mondlingvoj. Kia situacio estas en kursoj de aliaj lingvoj, mi ne scias.

Esperanto estas lingvo, kiel aliaj lingvoj. Pro tio ni ne miru, ke post la kurso restis nur kelkaj, kiuj fariĝis veraj anoj de nia klubo, kiuj vizitadas niajn kunvenojn, kaj ankoraŭ progresas en la lingvo. Al la multaj sufiĉas, same kiel al lernantoj de aliaj lingvoj, ke ili kapablas interkompreniĝi pri bazar aferoj, kiel ekzemple pri aĉetado, pri la vojo, aŭ interkompreniĝi per korespondado.

Mi mem spertis, ke nur unuopuloj kapablas post la kurso uzi la lingvon parolante ĝin. Se temas pri esperantistaj kluboj, do ni klopodu almenaŭ dum la oficiala programo ne krokodili. Kursfinintoj devas esti tre paciencaj por ĉeesti tiajn kunvenojn. Ĉar ili ne konas sufiĉe la lingvon, ne al kutimiĝas ankoraŭ aŭskulti diversajn elparolojn, ili ne havas ankoraŭ tian vorttrezoron, por ke ili komprenu.

Se ili estas fidelaj kaj paciencaj, ili komprenas poste enhavon de la parolata vorto, sed ili mem ne kapablas paroli. En niaj programoj oni malmulte diskuteas. Kaj eĉ se ni diskutas dum niaj renkontiĝoj, kaj tion mi rekomendus, multaj homoj timas paroli. Ĉiam diskutas malmultaj, ĉiam la samaj. Ceteraj verŝajne timas paroli, ĉar ili estas konvinkitaj, ke ili eble balbutus, ke al ili mankus la vortoj. Nur malmultaj estas tiel kuraĝaj, kaj ne nur provas, sed klopodas paroli. Nur tiuj poste sukcesas. Kiamaniere helpi al la timuloj, mi ne scias, eble iu el vi povus rekomendi ian rimedon, ian sistemon, ian manieron.

Kompreneble, ke ankaŭ mi mem estis komencanto. Kiel mi komencis kun esperanto, mi povas koncize diri.

Post la baza lernejo mi komencis lerni metion en Škoda uzino en Plzeň. Post duonjaro de la metilernado mi laboris en laborejo, kie estis jam ankaŭ pli aĝaj metiistoj. Dum la manĝado ni lernantoj sidis ĉe unu longa tablo kun la laboristoj. Mi rimarkis, ke du el la laboristoj parolas kune fremdlingve. Mi supozis, ke temas pri itala lingvo, do mi demandis mian najbaron. Li informis min, ke ĝi estas esperanto. Mi dankis por la informo, kaj mi sciis denove nenion. Mia najbaro atentigis ambaŭ esperantistojn je mia demando. Venontan tagon unu el ili dum la manĝado sidiĝis apud mi, kaj donis al mi bazajn informojn. Li rakontis pri sia kunlaboranto kaj samideano, kiu per esperanto antaŭ la milito estis kelkfoje eksterlande, kaj tuj invitis min viziti klubon. Mi ne vizitis ĝin, ĉar mi loĝis ekster Plzeň kaj krome, semajnon mi laboris antaŭtagmeze, semajnon posttagmeze.

Post unu jaro mi komencis studi industrian lernejon. Foje el la tramo mi rimarkis ŝildon super eniro de iama magazeno. Tie estis skribite io pri esperanto. Mi iris tien rigardi. En la montrofenestro krom alia mi legis la informon, ke post 14 tagoj komenciĝos la kursoj. Mi aliĝis. La kurson gvidis samideano Rudolf Burda. Certe iuj esperantistoj konis lin, ĉar li estis agnoskata, tio estis en la tempo post la likvido de la asocio.

La kurso daŭris 20-foje po 2 horoj. Dum la duonjaro, kiam mi vizitadis la kurson, mi havis feliĉon. Tute hazarde mi sukcesis aĉeti en antikvaĵejo vortaron de Filip. Post la kurso mi konis gramatikon kaj kompreneble mi havis ankoraŭ malgrandan vorttrezoron. Pilzenan klubon mi vizitadis malofte, ĉar, kiel mi jam diris, mi loĝis ekster la urbo.

Mi abonis tiam la verŝajne solan atingeblan gazeton – El Popola Ĉinio. Mia lingva nivelo estis tia, ke mi konis garantikon, kaj kapablis legi kelkajn vortojn el la tuta gazeto. Mi havis paciencon kaj klopodis legi la artikolojn kun la vortaro en la mano. Komence estis frazoj, ke mi eĉ duonon de iliaj vortoj serĉis en la vortaro. Pasis ia tempo, mi kapablis legi preskaŭ sen vortaro. Tiam mia fakta lingva nivelo estis tia, ke mi komprenis legaĵon, ĉar se mi bezonis, mi havis tempon pripensi la signifon de la vorto aŭ enhavon de la frazo. Mi ne komprenis parolatan vorton, mi ne kapablis paroli. Kun tia nivelo mi venis al Praha, kie mi tuj komencis vizitadi regule la klubon. Mi estis libera, mi havis sufiĉe da tempo, kaj mi povis sperti ion novan. Ĉiusemajne mi aŭdis dum du horoj esperanton kaj renkontis tie eksterlandajn esperantistojn.

Tiam estis kutimo, ke parto de la klubanoj vizitis post la klubo ankoraŭ kafejon. Kompreneble kun fremdaj gastoj. Ĝis nun mi povis por interkompreniĝi uzi ĉeĥan lingvon. Kun fremdlandanoj ne. Do mi devis komenci klopodi prepari en mia cerbo simplajn ĉeĥajn frazojn, kiujn mi silente tradukis en esperanton, kaj poste provi elparoli. Tiel okazis, ke mi gajnis pli ampleksan vorttrezoron, kaj fine mi komencis en esperanto ankaŭ pensi. Mi venkis.

Grandajn spertojn mi gajnis, kiam mi komencis gvidi la kunvenojn. Tiam mi devis reagi al diversaj cirkostancoj aŭ surprizoj, kiuj okazis dum la programoj.

Vi vidas, kiel pene mi ellernis esperanton. Tamen mi ne povas diri, ke mi konas ĝin. Ĉar ankaŭ ankoraŭ mankas al mi vortoj. Aŭ mi ne konas ilin, aŭ mi ilin forgesis. Precipe lastatempe, kiam mi malmulte vizitas la klubon, kaj mi ne havas alian eblecon paroli.

(Finota)

Amo nomiĝas Eli
de Jaroslav Krolupper

Kiam oni vokas: AMO
eĥo tuj resendas: ELI
Junulino, poste damo
ĉiam ame versojn selis

Rajdvestita, sen ornamo
veran amon ŝi rivelis
Kiam oni vokas: AMO
eĥo tuj resendas: ELI

Ŝi rigardis amon dramon
preta pro ĝi eĉ dueli
Kvankam ardas en ŝi flamo
ŝi sukcesis ne degeli
Kiam oni vokas: AMO
eĥo tuj resendas: ELI

La vivojubileo de Eli Urbanová

Komence de februaro 2007 nia poetino kaj verkistino Eli Urbanová ĝisvivis gravan jubileon kaj okaze de tio ĉiuj pragaj kaj certe ankaŭ tutmondaj geesperantistoj deziras al ŝi ĉion bonan, firman sanon kaj multajn kreajn fortojn por ŝia plua poezia verkado.

S-anino Eli Urbanová (naskiĝinta en 1922) estis membro de Akademio de Esperanto, ŝi estas honora membro de UEA kaj de ĈEA kaj precipe alte estimata kaj ŝatata membro de Esperantista Klubo en Praha. Per siaj detemp-altempaj vizitoj ŝi solenigas kaj beligas la kunvenojn de nia klubo.

Ŝia poezio verkaro estas grandega. Nemirinde, ke ŝi estas ano de la ĉeĥa Civito de Verkistoj kaj de la internacia verista asocio EVA, ŝi estas envicigita en la renoma brita eldono de Who is Who (1994). Ŝia originala Esperanta verkaro konsistas el poemaroj „Nur tri kolorojn“ (1960), „El subaj fontoj“ (1981), „Verso kaj larmo“ (1986), „Vino, viroj kaj kanto“ (1996), „El mia buduario“ (2001) kaj „Rapide pasis la temp’“ (2003). Krome unu ŝia poemaro aperis ankaŭ ĉeĥlingve en traduko de Josef Rumler en dulingva eldono „Peza vino/Těžké víno“ (1996).

Grandan atenton gajnis ŝia autobiografia romano „Hetajro dancas“, eldonita en 1995 en Chapeco en Brazilo. En tiu ĉi verko ŝi priskribis kaj sian personan vivon, kaj la esperantistan vivon kaj ankaŭ eventojn el la historio de nia klubo. Pro tiu ĉi libro Eli Urbanová ricevis premion de OSIEK dum la konferenco okazinta en Strážnice en la jaro 2001, kiam la libro estis deklarita „Libro de la jaro“.

En la antaŭparolo al ŝia unua poemaro „Nur tri kolorojn“ Julio Baghy karakterizis ŝin „juna ĝardenistino en la florgardeno de nia espeanta poezio“. Kaj ŝi mem skribis: „Kial mi estas, kial mi estas? Kial min interesas, kio min interesas? Kial mi verkas, kiel mi verkas? Klaraj demandoj postulas klaran respondon. Ĉi tie ĝi estas: Ĉion kulpis viroj.“

Kiuj viroj? Legu ŝiajn verkojn. Vi renkontos ilin.

(-jpa-)

D-ro Kamarýt sepdekjara

Dum la aliaj sin amuzis,
profiton tiris, eĉ misuzis,
vi instruadis, oratoris,
redaktis, verkis: Vi laboris.

Dum la aliaj sole ŝajnis,
flatojn, titolojn, rangojn gajnis,
vi organizi nur preferis
kaj zorge gvidi: Vi oferis.

Dum la aliaj... Tion flanke.
Al Vi ni ĉiuj pensas danke.
Danke rigardas en okulon.
Do dankon! Dankon! Kaj gratulon!

1953 Eli Urbanová

Kiam vi larmojn verŝas

Al aktorino Eva Seemannová

Unue la impresoj
de ege belaj kruroj.
Mi ĵurus, ke al ili
fiksiĝis la okuloj.
Detaloj: Harlinio.
Ŝanĝema bril' de broĉo.
Kaj tamen tre, tre baldaŭ
nenio – nur la voĉo.

Via ton' tragedia!
Iu poŝtukon serĉas.
Ĉar estas vi unika,
Kiam vi larmojn verŝas...
Jes, Eva, al vi rozojn!
Bukedon grandan, sciu!
Kaj al la kor' vin premi
kaj danki por ni ĉiuj.

1956 Eli Urbanová

Al Eli Urbanová

Mi gratulu al la poetino,
krome laŭdu versan flaton lertan.
Mi ne ploru pro certega fino.
Ŝi pardonu konsileton spertan:

Ne al tiuj, kiuj provis gvidi,
dankon diru, sed al kolektivo
konvinkita pro la sperto fidi,
ke nur en ĝi venkas ofensivo.

5. 12. 1953 Stanislav Kamarýt

Eli Urbanová

Když roníš slzy

Herečce Evě Seemannové

Nejdřív všechna pozornost
k pěkným nohám se stočí.
Přisáhala bych, že k nim
zamíří všechny oči.
Detaily. Účes vlasů.
Lesk odrazů brože zas.
A přece velmi brzy
nic jiného – než hlas.

Tvůj projev, tón tragický!
Někdo tu posmrkává.
Vždyť tvá každá slza je
tak jedinečně pravá...
Ode všech, Evo, růže!
Kytici velkou s díkem!
A k srdci tě přitisknout
se zvlhlým kapesníkem.

2006 Přeložil Čestmír Vidman

Jiří Karen

Sub la libera ĉielo

II.

Elementoj

Akvo

2

En la feliĉa tempo de la infanaĝo
ĝi movadis niajn mueliletojn
iradis sur gutrandoj
al roso ĝi surmetadis
Irizajn ĉapetojn

De ŝtono sur ŝtonon
kiel klaŭno ĝi saltas
Sur strandoj ĝi ludas
kun konkoj kaj ovalŝtonetoj

Akvo rosa arĝento
havas guston de kvarcŝtonoj
(Tiu suba tiu el profundo
pri kiu demandas
puto)

3

Diafaniĝinta
pro matena malvarmo
ĝi fluas silente en soleco
Ĉarma en koksoj
Intima en okuloj
Kiel elasta kablo
ĝi katenas al si
vilaĝojn kaj urbojn
Nokte
ĝi amindumas Lunon

Pluvo

Drapiraĵo el etaj gutoj
delikate leviĝis super la horizonto
Sur papero de lagoj riveroj kaj maroj
disruliĝis kiel hidrargo
tepidaj gutetoj

Vrakoj de nuboj – ĝis nun dorsflanke
al maroj kaj riveroj turnitaj

krispiĝis kaj malsereniĝis en nigraj amasoj
gutas

El la fendo de la firmamento
- lomete atendu pluvo – vi petas
- kaj en sablon
- ne enskribu
- niajn paŝojn

Ĉu peti? Vane Fluetoj
de flaketoj kaj rojetoj
pasas tra la lando

En la ŝtrumpojn kaj la ŝuojn
pluvas al ĉio kaj sur ĉion
kio en ni dancis

Siajn manojn la pluvo lavas
en la sango de folioj aŭtune
kiel Pilato

Preteru sur vojeto iras geamantoj
Li pensas: - Kio estus
se post diluvo restus en la mondo
nur dek mortemuloj
kaj inter ili neniu virino? –
Ŝi suspiras: Forprenu akvo
Pontojn kaj pontetojn
de vanaj promesoj

Post pluvo fulmotondro kaj ventego

Ventego
vadanta laŭlonge de fosaĵo
disdancigis
ŝanceliĝemajn foliojn

Susuro de la pluvo lavas
ardezajn tegmentetojn
kaj fasadojn de domoj
ombrigataj de vito

Kaj vi sub la tegmento
alpremiĝos al muro
kiel birdido

Jen
tondretado ekkuŝis
kiel satiĝinta besto

Je trumpetoj de roskovritaj floroj
satludas la herbejo

Fonteto

1
Ĉirkaŭigitaj de ardo kaj varmego
ni iris
du tagojn kaj du noktojn
esperante ke fonteton
(tiel profunde)
trafos kruĉo

Estis tie nenio
Eĉ ne lajno de spuroj
Simple nenio estis tie
Nur
serĉado

Fakte do ĉio

2
Subtila kvazaŭ el nemondo
el fenduj de roko ĝi fontas
Ĝi ŝajnis malforta Jam ĝi militas
kontraŭ ŝlimo
Al sia propra voĉo
tra ŝtonaro ĝi faras vojon

Fontujo

Mi kaj verda arbostumpo
tra fonteto ni legas
paliĝintan tekston de kontrakto
kun grandpotenco nomata
amo

En luna duonlumo
en silentetaj kurbiĝoj
ni subaŭskultas
pri kio parolas
arbo kun arbo
kaj vojo kun ŝtono

Rivereto

1
Se lumas la suno
brilas smeraldoj
Pri ezokoj ĝi babilaĉas

kun karpoj kaj tinkoj
poste ĝi surmetas sur la nukon
ĉapelon de la firmamento kaj rapide
tra akvokanalo ĝi hastas
por ke iom pli malproksime
sur ebena ĝi dormu
kaj revu
pri akvofalo

2
Ŝlimiĝinta kaj malklara
Simila al rampulo
inter forfalaĵoj ĝi serĉas vojon
Ĝi hastas Ĝi kuras
por rakonti al la maro
kio ĝin atendas

Pri kio ni cerbumis ĉe la rivero Hrazdan

Susuras arboj kaj la akvo de la rivero
dum la paco
en la folietojn igas ĉarpent
fare de la estingiĝanta suno
tiun ĉi mesaĝon:

Oni ordonas veneni toksan rankoron
neniigi ordonojn pri neniigo
Ekstermi ekstermadon
Murdita estu murdo
Elloĝigita estu suferado kaj militaj motivoj
estu forstrekitaj el la lernolibroj de logiko –

Nevidebla skribisto vento
ĉarpentas siajn ordonojn en la sablon de la lando
Sur la ponto el legendoj venas misioj
Flavbekulo tigo kiel ĝendarmo kun surmetita
bajoneto
Forpelas kardojn kaj polvon el la lando
La reverso estas devigita montri la averson

Kaj la skribisto vento skribas plu – proskribito
estu deklarita en nia lando malsato
Deportita estu karcinomo
Masakritaj estu masakroj
kaj teruro de la genocidoj –

(daŭrigo sur la p. 19)

Čestmír Vidman

Karlu Havlíčku Borovskému

Borovskému

Do dneška nás všude vítá
ta jeho řeč rázovitá
Nabroušená řeč
jako ostrý meč

Vybrat vždycky
správná slova
Bez okolků Znova Znova
Přímo k jádru věci

Sám sobě

Je to nebývalá shoda dat
kterou kronika ti poví
Mohl ses v kolébce rozplakat
sto let po Havlíčkovi

A je to pocta veliká
začít život v stínu básníka
rebelantského novináře
Padají listy kalendáře

Už jsi ho překonal
o padesát let
Ale on žije dál
jako by neopustil tento svět

Je stále s námi
břítický hlas známý
A co tys vykonal navíc
Za to půlstoletí?
Hanbíš se trochu
Krev dosud neuniká ze žil
Jsi rád že jsi dnešek přežil

Nám všem

Havlíček je předek tvůj
Jeho památku opatruj
a v jeho díle pokračuj
Prostě a přesně uč se psát
Za svými slovy pevně stát
Nebát se a vytrvat
Předkládám projev propagační

Nepoučuj
A začni!

Esperantigis Jaroslav Krolupper

Al Karel Havlíček Borovský

Al Borovský

Ĉiuj konas ke atutas
lia parol' rezoluta
Akrigita lango
kiel pikostango

Elektu justa
de vorto ĝusta
Ree Ree Senrespekte
Trafi kernon rekte

Al mi mem

Ke strange povas datoj harmonii
evidentigas dokument'
Do vi povis en lulilo krei
post Havlíček jaroj cent

Granda honoro kaj omaĝo
komenci vivon kun mesaĝo
de ribelema ĵurnalist'
Jen tagoj mortas sen rezist'

Vi lin jam postvivis
je jaroj kvin dek
Sed li aktivas
kvazaŭ li restus sur la ferdek'

Estas porĉiama
La voĉo akra fama
Kaj kion vi faris plie
dum duon' de centjaro?
Vi iom hontas
Ankoraŭ la pulmoj spiris
Pluan tagon vi akiris

Al ni ĉiuj

Havlíček via antaŭulo
Respektu tial la postulon
Starigi homojn al spegulo
Per klara vorto interveni
Honora resti vi pripenu
Ne timu kaj eltenu
Mi prezentas kion ni ja vartu

Ne instruu
Kaj startu!

Kamila Bártlová – Lampířová

Maminčina studánka

Když byla jsem malinká
to mne moje maminka
brávala k našemu polu
Vždycky spěchaly jsme spolu
po kopci tou kamenitou cestou polní
kde mateřídouška dosud stejně voní

A tam ve stráni téměř ukryta
pár kroků od potůčku koryta
malá studánka trůní
Po koření má vůni
co kolem kvete v drnu
i z růžových květů trnu
a z živé kapky rosy ranní
voda její upitá z dlaní
osvěžení nám vždy dala
Snad že byla jsem tak malá
já věřila v moc její kouzelnou
vždyť maminka má poklekla se mnou
i ona upíjela nejednou z dlaní
ti křišťálovou voděnku našich přání

A tak zůstal v srdci mém
ten obraz jak dětský sen

Proč vzpomínám na maminku
Proč vzpomínám na studánku

I dnes je mi třeba osvěžení
I dnes je mi třeba ujištění
že kouzelné studánky vody lesk
nezničí nám válečné bomby blesk
že nevypaří se křišťály v dým
že z nás – jak v Hirošimě –

nezbude jenom pouhý stín

Ta studánka i to je domov můj i náš
i polní cesta po níž se vždy vracíváš
i každý jeden luční květen
musíme bránit všichni hned
Ta kouzelná moc jistoty je přece v nás
Tak slyším rodného kraje i Země hlas

Kamila Bártlová – Lampířová

Puteto de mia panjo

Estis mi malgrandulino
braktenata en la sino
panjo min per mano gvidis
Al herbejo ni rapidis
al monteto sur ŝtonoza vojo flora
kie daŭre serpilo bonodoras

Tie sur deklivo kvazaŭ time
ĉe rojeto preskaŭ tuŝproksime
eta puto kalme tronas
Je akoro ĝi aroma
kiu kovras ĉirkaŭaĵon
De rozdornoj ĝi ostaĵo
trinkigata de roseto
Pura akvo de la puto
la freŝecon al ni cedis
Kaj mi etulino tiam kredis
ke naskiĝas fort' magia
Tie genuiĝis ankaŭ panjo mia
eĉ ŝi trinkis ofte el mankavo
la kristalan akvoj spicitan de ravo

Tiu bildo en la koro restas
kiel infanrevo daŭra kaj Majera

Kial mi panjon rememoras
Kial mi puteton korfavoras

Mi bezonas eĉ nun refreŝigon
Mi bezonas eĉ nun recertigon
ke la akvon el la sorĉa puto
ne eltrinkos bomboj dum minuto
ne ŝanĝiĝos akvo en vaporon
kaj ke ni – kiel en Hiroŝimo –
ne forbrulos en pulvoron

Preter puteto, herbejo kaj rojo
gvidas nin hejmen konata kruta vojo
kaj ni devas eĉ galantin
gardi kiel diamanton
Dank' al la puteto mi restadas certa
ke la pordo en patrion estas plenaperta

Esperantigis Jaroslav Krolupper

Vyšla nová kniha Čestmíra Vidmana „Než padne mlha docela“ – paměti a vzpomínky člena našeho klubu.

Tato obsáhlá kniha vypráví životní osudy Č. Vidmana, komerčního inženýra, pracovníka zahraničního obchodu, který při prodeji československých výrobků a měřicích přístrojů procestoval celý svět. Č. Vidman je zároveň známým českým básníkem, autorem básnických sbírek Moře, Miska rýže, Vteřiny slunečních hodin, Hra zvaná život, Čím se líčíte lčiki, Pod horou Fudži, Křížalami voní dálka, Cestou a Vyhližení k domovu. Je také autorem řady divadelních her pro českou a esperantskou herečku Evu Seemannovou. Ve svém životě se Č. Vidman seznámil s řadou významných osobností, se spisovateli, malíři, bibliofily. To vše je v jeho nové knize, kterou redakčně a technicky připravila Ing. Margit Turková.

Ĉestmír Vidman: Antaŭ ol plene falos nebulo

En la kulturdomo „Vltavská“ en Prago okazis la 31-an de oktobro kultura programo el la verkaro de la ĉeĥa poeto kaj nia samideano Ĉestmír Vidman, honore al lia 85-jariĝo. La programon prezentis la famaj ĉeĥaj geaktoroj s-ino Gabriela Vránová kaj s-ro Alfréd Strejček. Inter la prezentitaj poemoj de Vidman estis kelkaj, aparte dediĉitaj al la granda ĉeĥa ĵurnalisto kaj poeto Karel Havlíček Borovský, kiu naskiĝis la 31-an de oktobro 1821, do la saman tagon kiel Ĉestmír Vidman, sed je cent jaroj pli frue. En la programo ne estis prisilentita ankaŭ la esperantisteco de Vidman kaj la aktoro Strejček konfesis, ke li devas senpolvigi sian esperanton, ĉar ankaŭ li antaŭ jaroj lernis la Internacian Lingvon sub gvido de lia amikino aktorino Eva Seemannová.

Dum la kultura programo estis vendata nova libro de Ĉestmír Vidman „Než padle mlha docela“ (mi esperantigis la titolon kiel Antaŭ ol plene falos nebulo) – ĝi estas impona ĉeĥlingva verko preskaŭ 400-paĝa, iaspeca aŭtobiografio kaj libro de rememoroj de Ĉestmír Vidman, kiun la aŭtoro verkis ankoraŭ kiam li povas iom vidi, iom aŭdi kaj iom paŝi, do antaŭ ol plene falos nebulo sur lin. Li verkis la libron kvar jarojn kaj ĝi povis aperi entute dank’ al la redakta kaj teknika laboro de Ing. Margit Turková. La libron la aŭtoro eldonis proprakoste.

Ĉestmír Vidman naskiĝis en Italio, kie lia patro tiam laboris, sed poste li vivis en diversaj lokoj en Ĉeĥoslovakio. Nur post la dua mondmilito li povis finstudi altlernejon kaj fariĝi komerca inĝeniero. Li laboris en entrepreno por eksportado de ĉeĥoslovakaj maŝinoj kaj aparatoj, precipe de AVIKO – aŭtomato por kontrolo de globetoj en globlagroj. Li travojaĝis la tutan mondon, nur en Japanio li estis pli ol dekfoje. Multe helpis lin lia poligloteco, li scipovas vicon da lingvoj, inter ili ankaŭ esperanton.

Sed Ĉestmír Vidman estas ne nur fakulo pri komercado de teknikaj produktoj, jam de komence li interesiĝis pri literaturo kaj ĉefe pri poezio kaj jam junaĝe li komencis verki poemojn. Dank’ al tio li persone konatiĝis kun multaj gravaj ĉeĥaj poetoj kaj verkistoj kaj li estas membro de ambaŭ nuntempaj asocioj de ĉeĥaj verkistoj. En la libro li interese priskribas siajn renkontiĝojn kun iuj el la verkistoj kaj li ekz. prezentas la leteron, kiun sendis al li la granda ĉeĥa verkisto Josef Škvorecký. El tiu letero mi citu nur fragmenton: „Ankaŭ min interesas, ke vi estas esperantisto. Mia patro estis granda esperantisto. Mia patro estis granda esperantisto, li korespondis ekzemple kun japanino nomata Keiko Kazima, kiu skribis al mi (anglalingve) kondolencon, kiam mia patro mortis. Poste li korespondis ankaŭ kun iu vjetnamo el la Nordo, kiu al li, jam dum la vjetnama milito, sendis mandolinon en la urbon Náchod. Tre plaĉis al mi viaj poemoj, precipe tiuj dediĉitaj al Eva Seemannová. Tion mi bedaŭrinde ne konis.“

Ĉestmír Vidman estas membro de diversaj kulturaj organizaĵoj, inter ili ankaŭ de Asocio de ĉeĥaj bibliofiloj, kiuj en konvena formo aperigis multajn liajn poemojn. Liaj novjaraj bondeziroj kun ilustraĵoj de elstaraj pentristoj apartenas al dezirataj objektoj de kolektado de multaj kolektantoj kaj precipe esperantistoj ŝatas liajn bondezirojn kun la esperanta traduko de Rumler, Karen, Urbanová kaj multaj aliaj.

En la libro Ĉ. Vidman dediĉas grandan spacon al esperanto kaj tre bone kaj kun alta aprezo li skribas ekz. pri nia klubo, sed ankaŭ pri multaj elstaraj esperantistoj, kun kiuj li konatiĝis kaj pasigis kun ili multajn artismajn diskutadojn, ekz. kun Josef Rumler, Jiří Karen, Eli Urbanová, Eva Seemannová, Margit Turková kaj aliaj. Ekzemple por Eva Seemannová li verkis multajn teatraĵojn, kiujn ŝi prezentis en formo de „Teatro de unu aktoro“ ĉu ĉeĥlingve, ĉu esperantlingve. Ekz. la teatraĵon „Mi, Eliza Premislidino, la ĉeĥa reĝino“, kiun Eva Seemannová prezentis en 1996 dum la Universala Kongreso en Prago.

Al Ĉ. Vidman multe helpas kaj fakte ĉiujn liajn tajpitajn tekstojn enkomputiligas s-anino Margit Turková. Ŝi loĝas en proksima urbo Obořiště kaj en ŝia loĝejo dum jardekoj okazis loĝejaĵ prezentadoj kaj provludoj de Eva Seemannová kun ĉeesto de lokaj amikoj. Malmultaj scias, kiom da „postkulisa“ poresperanta laboro efektiviĝis tie dank’ al Margit Turková.

(jpa)

Elaktivecoj de nia klubo...

La kunvenoj de nia klubo okazas preskaŭ regule ĉiuŝaŭde posttagmeze en la kunvenejo, kiun disponigas al ni la urba oficejo de la subdistrikto Prago 1. La kunvenejo troviĝas en la centro de la urbo, en la strato Ve Smečkách, n-ro 25. Dum la kunvenoj okazas ofte prelegoj, al kiuj kontribuas ges-anoj Zemanová, Ing. Trojan, Ing. Turková, Ondráček, Patera. Kelkfoje nian kunvenon vizitis eksterlandaj geesperantistoj.

Nia klubo kunlaboras kun la Asocio de esperantistoj-handikapuloj, kie seminarioj ofte okazas en nia kunvenejo antaŭtagmeze sabate-monatfine. Krome niaj membroj partoprenas la lingvaj seminarioj kun turismaj aranĝoj en la Pensiono Espero en Skokovy en la Bohemia Paradizo.

La klubo eldonas trifoje jare sian Bultenon, kiu havas ĉefe literaturan enhavon, ĉar tie aperas kontribuoj de ĉeĥaj verkistoj, kiuj ŝatas ke iliaj verkoj aperas ankaŭ en esperanto; ili estas Zdenka Bergrová, Věra Ludíková, Jiří Karen kaj ankaŭ Čestmír Vidman, kiu mem estas esperantisto. Bonŝance ni havas novan membron, kiu estas s-ano Jaroslav Krolupper, sperta esperanta poeto kaj poemtradukanto, kiu ĉi-jare ricevis unuan premion en literatura konkurso en Bulgario.

Krome ni partoprenas la ĉeĥlingvajn literaturajn vesperojn de la poetino Věra Ludíková, en kiuj neniam mankas esperanta recitado fare de s-ano Josef Vích. Ĝojigis nin, ke la ŝtata biblioteko eldonis detalan bibliografion de verkoj de la poetino Zdenka Bergrová; en tiu verko estas multfoje citata nia Bulteno, kiu aperigas tradukojn de verkoj de Z. Bergrová.

Ni ne forgesu, ke nia membro estas d-ro Petr Chrdle, posedanto de libroeldonejo KAVA-PECH, kiu eldonas ankaŭ esperantajn librojn. Lastafoje tie aperis nova lukso eldono de Biblio (kun ambaŭ Testamento kaj Duakanonaj Libroj). Iuj niaj membroj partoprenis ankaŭ la UK en Vilno kaj en Florenco.

Esperanto en la Radio

Esperanto v rozhlase

Radio Polonia, Varŝava vysílá denně půlhodinový pořad na krátkých vlnách, a to od 17.00 do 17.30 hod. na 7270 a 7285 kHz (41,26 a 41,18 m) a od 20.00 do 20.30 hod na 7290 kHz (41,15 m). V zimním období slyšitelnost není dobrá. Vysílá též přes satelit a na internetu <http://www.radio.com.pl/polonia/eo/esperanto>. redakcio@radio.com.pl

Ĉina Radio Internacia, Peking vysílá denně hodinový pořad na krátkých vlnách, v Evropě slyšitelný od 20.30 do 21.30 hod. na 7265 a 9745 kHz (41,29 a 30,79) a od 23.00 do 24.00 hod na 7315 a 9860 kHz (41,01 a 30,43 m) a též na internetu <http://es.chinabroadcast.cn> esperanto@cri.com.cn

V Evropě je též středovlnné vysílání od 17 do 18 hod na frekvenci 1215 kHz (247 m)

Radio Vaticana vysílá esperantské desetiminutovky takto:

V neděli a o církevní svátky od 21.20 do 21.30 hod. (a repríza od 23.50 do 24 hod.) na krátkých vlnách 4005 a 5890 kHz a na středních vlnách 585 a 1530 kHz ve středu a ve čtvrtě od 21.20 do 21.30 hod. na krátkých vlnách 7250 a 9645 kHz na stř. vlně 1611 kHz. Vysílá též přes satelit a na internetu

www.vaticanradio.org/esperanto/proesperanto.htm
esperanto@vaticanradio.va

Itala Radio Internacia, Řím vysílá v sobotu od 21.00 do 21.20 hod. na krátkých vlnách 6110 a 9745 kHz (49,10 a 30,78 m), též přes satelit a na internetu

www.international.rai.it/radio/index.shtml
ondacorta@rai.it
trad.esperanto@rai.it

Zemřel William Auld

Ve věku 82 let dne 11. Září 2006 zemřel jeden z největších současných esperantských básníků, spisovatelů a překladatelů William Auld. Před několika lety jej esperantisté navrhovali na Nobelovu cenu za literaturu.

W. Auld byl Skot a byl na to hrdý. Za druhé světové války bojoval jako letec, po válce po studiích angličtiny a anglické literatury se stal středoškolským učitelem. Zároveň se začal aktivně věnovat esperantu a esperantské literatuře. V roce 1952 vyšla kniha básní „Kvaropo“ (Čtveřice), na které se podíleli čtyři skotští esperantisté – básníci a touto knihou byla zahájena tzv. „skotská škola“, která významně ovlivnila esperantskou poezii.

Jedním z autorů byl W. Auld a jeho básnická sbírka se nazývala „Dech vášně“. O 13 let později vyšla jeho další básnická sbírka „Dětská rasa“, rozsáhlá epopej osvětlující vývoj lidstva a dokazující, že lidstvo dosud nedosáhlo své dospělosti. Toto dílo bylo přeloženo do několika jazyků. Jeho další básnické sbírky jsou „Melodie jedním prstem“, „Nálady“, „Z jednoho zeleného života“ – je to narážka na esperanto, jehož znamením je zelená barva, a „Rýmované dopisy“, které si psal a vyměňoval s esperantskou básnířkou Marjorie Boultonovou.

W. Auld byl plodným překladatelem básnických i prozaických děl např. W. Shakespeara, J. Londa, R. Burnse, Lorda Byrona, J. R. Tolkiena a mnoho dalších. A byl autorem mnoha studií o esperantské literatuře. Redigoval např. obsáhlou „Anglickou antologii“, „Skotskou antologii“ a „Esperantskou antologii“ a všechny opatřil obsáhlými a závažnými literárními komentáři. Byl také autorem učebnic esperanta, např. „Esperanto: A new approach“, která vyšla také v němčině a ve švédštině, a „Paŝoj al plena posedo“ (Kroky k úplnému zvládnutí), učebnice pro pokročilé, která vyšla celosvětově v pěti vydáních.

Z Auldových úvah uvádíme několik krátkých citátů.

Esperanto také prohloubilo a rozšířilo mé odborné znalosti. Jako student i profesor literatury jsem se mohl seznámit s literaturou jiných zemí jedině prostřednictvím esperanta. Svými jinými dvěma jazyky – angličtinou a francouzštinou – nemohu nic vědět například o maďarské, české či švédské literatuře a velice málo o japonské nebo španělské. Mimo to existující překlady v těchto dvou jazycích jsou všeobecně velmi nedokonalé v porovnání s odpovídajícími překlady v esperantu. Anglické překlady např. Peer Gynta, Pekla a Květů zla jsou slabé proti esperantským překladům těchto děl, zatímco anglické překlady Tragédie člověka a Křtu svatého Vladimíra jsou nanejvýš nepovedené a neposkytují naprosto žádný dojem o velikosti jejich originálu. Britští čtenáři mají všeobecně velmi pokroucený a nepravdivý pohled na světovou literaturu... S esperantem jsem si mohl přinejmenším uvědomit tuto skutečnost a být opatrný ve svých soudech a názorech.

Esperanto mi poskytlo především skvělý nástroj pro literární tvorbu, nadřazený pro svou pružnost a přesnost proti strnulé a zevšednělé angličtině.

Nejspolehlivějším důkazem dobré budoucnosti esperanta je jeho minulost, jeho historie. Ani dvě světové války, ani vládní zákazy či dokonce pronásledování, ani spory mezi esperantisty samými, ani lhostejnost a nepřátelství mocných úřadů nedokázaly jazyk zničit; naopak se neustále šíří a je respektován. Esperanto odpovídá společenské nutnosti; rostoucí hospodářské i politické sjednocování světa (dosud nedosažené) stále více dává cítit tísnivou naléhavost společného jazyka... Žádný národní jazyk není vhodný pro tuto úlohu... Esperanto se pro to dokonale hodí. Takže, jestliže společenská nutnost společného jazyka bude trvat, esperanto bude nakonec rozhodně přijato.

(-jpa-)